# 92ª Universala Kongreso de Esperanto

Jokohamo, 4-11 aŭgusto 2007

# DUA BULTENO



Kongresa Temo

## Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto

# Enhavo


Loka Kongresa Komitato ..........
Por eniri la landon .......... 2
Kiel atingi la kongresejon .......... 3
Utilaj informoj pri Japanio kaj Jokohamo .......... 3
Loĝado en Jokohamo .......... 6
  Hoteloj kaj aliaj loĝebloj .......... 7
Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj .......... 11
  Vizitotaj urboj kaj vidaĵoj .......... 12
  Antaŭkongresaj ekskursoj .......... 16
  Postkongresaj ekskursoj .......... 19
Dumkongresaj ekskursoj .......... 20
  Tuttagaj ekskursoj .......... 21
  Duontagaj ekskursoj .......... 26
  Semajna skemo de ekskursoj .......... 29
Bankedo .......... 30
Provizora programo .......... 31
Programeroj dum UK .......... 32
Kiu kongresos kiam kaj kie? .......... 33
Ĝeneralaj informoj .......... 34
Kontaktinformoj .......... 36
Kongresaj perantoj ..........


## Loka Kongresa Komitato

| | |
|---|---|
| Prezidanto, eksteraj rilatoj | – SIBAYAMA Zyun'iti |
| Vicprezidanto, kunordigo UEA/LKK | – SYÔZI Keiko |
| Sekretario, informado | – HUZIMAKI Ken'iti |
| Loĝigo | – SUZUKI Keiichiro |
| Gazetara servo | – DOI Hirokaz |
| Informejo | – ISIKAWA Tieko |
| Programo | – TAHIRA Masako |
| Volontuloj | – ISINO yosio |
| Kasisto | – SAITO Tume |
| Giĉeto | – KAWANISI Teturo |
| Kongresejo | – Yas KAWAMURA |
| Kongresa kuriero | – HORI Yasuo |
| Junulara programo | – SUZUKI Issei |
| Ekskursoj | – TURUTA Sizuo |
| Infanaj aranĝoj | – SANO Yoko |
| Artaj aranĝoj | – HAZAMA Hirotomi |
| LKK-hejmpaĝo | – IWAYA Mituru |
| Antaŭ- kaj postkongresoj | – NAKAMITI Tamihiro |

Kopirajto de la kovrila foto: YCVB

92-a Universala Kongreso de Esperanto

# DUA BULTENO

Jokohamo

4-11 aŭgusto 2007

# Por eniri la landon

**Ĝenerale.** Bonvolu noti, ke la reguloj pri vizdonado malsamas laŭ landoj, kaj ke ili konstante ŝanĝiĝas. Tial bv. nepre mem kontroli ĉe la plej proksima kongreslanda diplomatia reprezentejo (bv. mem trovi ties adreson en via ĉefurbo aŭ najbara lando), ĉu vi devas havi vizon, kaj sub kiuj kondiĉoj. UEA kaj LKK ne povos helpi pri vizpetoj faritaj post la 1-a de majo 2007, kaj principe ne povos respondi al tiaj malfruaj petoj.

**Vizoj:** La civitanoj de EU-landoj, kaj interalie de la jenaj, ne bezonas vizon por eniri Japanion: Argentino, Aŭstralio, Ĉilio, Islando, Israelo, Kanado, Koreio, Kroatio, Makedonio, Meksiko, Norvegio, Nov-Zelando, Svisio, Urugvajo kaj Usono. Konsilindas tamen kontakti la plej apudan japanan ambasadejon por kontroli ĉu tiu ĉi informo ne ŝanĝiĝis intertempe.

Por peti la japanan vizon necesas prezenti financajn garantiojn kaj ateston pri asekuro por la periodo dum kiu oni estos en Japanio.

---

La kongresanoj mem devas zorgi pri la akiro de vizoj. En escepte komplikaj kazoj oni povas peti helpon de UEA kaj LKK.

---

**Datoj.** Bv. noti, ke la invitletero povas teksti nur por la periodo de la oficiala kongresa daŭro (4-11 aŭgusto, eventuale plus la daŭro de menditaj antaŭ- kaj/aŭ postkongresoj). Se vi bezonas pli longan restadon, tion vi devas aranĝi private.

**Konfirmiloj kaj invitleteroj.** Normale la kongresa konfirmilo devus sufiĉi por pruvi la kongresanecon al la vizdona instanco. La konsulejoj povas postuli oficialan invitleteron, kiun UEA/LKK sendos se oni petas ĝin, al aliĝintaj kongresanoj el vizbezonaj landoj. Al nealiĝintoj oni ne povas sendi invitleteron nek aliajn konfirmaĵojn. Bv. konscii ke nek UEA nek LKK povas influi la decidojn de la konsulejoj.

**Mongarantio.** Senkonsidere ĉu oni havas aŭ ne la vizon, necesas pruvi ĉe la eniro en la landon ke oni posedas sufiĉajn monrimedojn por la restado. Al kongresanoj kiuj mendis kaj pagis loĝadon pere de UEA (aŭ venas je aparta invito de UEA), oni povas sendi, se necese kaj laŭ peto, konfirmon pri pagitaj servoj. Tio povas parte kompensi la postulon pri posedo de sufiĉaj monrimedoj. UEA kaj LKK ne donas financajn garantiojn al iu ajn kongresano. Kongresano mem devas pruvi al la vizdona instanco posedon de sufiĉaj rimedoj por restado en la kongresa lando.

**Asekuroj.** Unu el la postuloj por ricevi vizon estas akiro de asekuro, pri kio la kongresanoj zorgu mem. Ofte tute taŭga asekuro estas aĉetebla ĉe flughavenoj.

# Kiel atingi la kongresejon

La ĉefkongresejo kie troviĝas la kongresaj giĉetoj: 4-a kaj 5-a etaĝoj de Pacifiko-Jokohamo (Pacifico Yokohama); 1-1-1, Minato Mirai, Nishi-ku, Yokohama 220-0012, Japanio. (Bv. neniam skribi al la kongresejo.)

De la internacia flughaveno Narita al la urbo Jokohamo (Yokohama) estas kvar opcioj:

1) Per limuzina buso, vojaĝodaŭro ĉ. 90 minutojn, prezo 3 500 enoj. Iras je 7h20, 14h40, 15h40, 17h00, 18h00, 20h00 rekte al la ĉefkongresejo Pacifiko-Jokohamo; aliaj iras al la stacio JR-Jokohamo. La giĉeto por aĉeti bileton troviĝas en la flughavena halo, tuj antaŭ la elirejo de la kontrolata areo.

2) Per ekspresa trajno “Narita Express”, ĉ. 90 minutojn, 4 180 enoj. Duono el tiuj ĉi iras al JR-Jokohamo ĉiuhore.

En ambaŭ supraj opcioj sidloko rezervendas en la flughaveno.

3) Per trajnoj de JR “Rapid Service”, ĉ. 120 minutojn, 1 890 enoj.

4) Per trajno de Keisei “Skyliner”. Vd. retejon de LKK por detaloj.

De la stacidomo Jokohamo al la ĉef-kongresejo:

1) Per metroo 5 minutojn ĝis la stacio Minato-Mirai, 180 enoj. De Minato-Mirai piede 4 minutojn ĝis la kongresejo.

2) Per JR 3 minutojn ĝis la stacio Sakuragicho, 130 enoj. De Sakuragicho piede 12 minutojn ĝis la kongresejo.

3) Per taksio 10 minutojn, proksimume 740 enoj.

---

Por pli detalaj informoj konsultu la retpaĝaron de LKK: 🌐http://www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/espe/gheneralo.htm.

---

# Utilaj informoj pri Japanio kaj Jokohamo

**Situo:** La japana insularo situas oriente de la eŭrazia kontinento: proksimume de 122 ĝis 154 gradoj Or., de 20 ĝis 46 gradoj No. La tuta areo estas 378 000 km$^2$ (la 60-a en la mondo). Jokohamo, kun areo de 435 km$^2$, troviĝas en la meza parto de la insulego Honŝuu; 35 gradoj Or., 139 gradoj No. Ĝi najbaras al la ĉefurbo Tokio, sude.

**Loĝantaro:** En la lando vivas ĉirkaŭ 128 000 000 loĝantoj (10-a en la mondo; 49% estas viroj, kaj 51% virinoj). En Jokohamo loĝas ĉirkaŭ 3 600 000 homoj (2,8% de la tuta loĝantaro) Meza vivdaŭro en jaroj: 78,6 viroj, 85,6 virinoj.

**Loĝateco:** Tiu de Japanio estas 337 homoj/km$^2$. Tiu de Jokohamo estas 8 289 homoj/km$^2$.

**Klimato:** Averaĝa temperaturo en aŭgusto, 23,9-29,8 gradoj celsiaj. La vetero estas plej ofte suna, kaj tre humida. La kongresejoj kaj aliaj konstruaĵoj estas agrable klimatizitaj. Averaĝa kvanto de pluvo en aŭgusto: 158,7 mm.

**Lingvoj:** La japana estas la sola oficiala lingvo, kvankam en la lando loĝas ne nur japanoj sed ankaŭ koreoj kaj ajnuoj (praloĝantoj en la norda parto de la japana insularo) ktp. Preskaŭ ĉiuj japanoj lernas la anglan 3 aŭ 6 jarojn en lernejo, sed la kapablo komuniki en la angla estas malalta. Pro lastatempa multiĝo de gastlaboristoj precipe el Brazilo, Koreio (suda) kaj Ĉinio, kelkaj guberniaj kaj urbaj oficejoj ofertas servojn en la lingvoj portugala, korea kaj ĉina.

**Utilaj frazoj en la japana:** *Kon-niĉiŭa* (Bonan tagon), *Arigatoo* (Dankon), *Jokohama-ni-jukitai* (Mi volas iri al Jokohamo), *Paŝifiko-jokohama-ŭa-doko-desuka* (Kie estas Pacifiko-Jokohamo?), *Esuperanto-no-taikai-ni-sanka-ŝimasu* (Mi partoprenos en UK).

**Mono:** La oficiala mono estas la eno. Moneroj: 1, 5, 10, 50, 100, 500 enoj. Monbiletoj: 1 000, 2 000, 5 000, 10 000 enoj. Unu eŭro proksimume egalas al 150 enoj; unu dolaro al 120 enoj. Ĉiuj hoteloj, restoracioj, vendejoj (krom la malgrandaj) akceptas kreditkartojn, ekzemple VISA, MasterCard, JCB, American Express. El tiuj VISA estas la plej uzata.

**Monŝanĝado** okazas laŭ reguloj de libera merkato. Plejparto el la japanaj bankoj kaj vendejoj ne ekipas sin per mona aŭtomato (ATM), de kie eblas preni kontantan monon uzante eksterlandajn debetkartojn kaj/aŭ kreditkartojn. Dume multaj poŝtoficejoj jes ekipas sin per tia aŭtomato. Plejparto el la japanaj bankoj akceptas monŝanĝon al japana eno el, ekzemple, eŭro aŭ usona dolaro. La labortempo de la bankoj estas de la 9h00 ĝis la 15h00. Rekomendinde por eksterjapaniaj kongresanoj estas ŝanĝi monon: (1) en flughaveno, ĉefe por tiuj, kiuj alvenas al la lando vendrede posttagmeze kaj semajnfine, (2) per ATM ĉe poŝtoficejo, (3) en bankoj semajntage, aŭ (4) en hoteloj (laŭ iom malavantaĝa kurzo).

**Loka tempo:** UTC +9 horoj. Ne estas somera horŝanĝo.

**Trinkakvo:** La akvo estas ĝenerale bonkvalita. Oni povas eĉ trinki akvon el neceseja krano, kvankam tio ne estas tre rekomendinda. En restoracioj akvo aŭ teo estas senpage servata. En la kongresejoj malvarma akvo estas senpage trinkebla.

**Vendejoj** funkcias proksimume de la 10-a ĝis la 20-a horo. La specialaj vendejoj, nomataj "oportunaj", funkcias de la 7-a ĝis la 23-a horo. Eĉ troviĝas oportun(eg)aj vendejoj kiuj funkcias 24 horojn tage kaj la tutan jaron.

**Elektraj tensio kaj frekvenco:** 100V kaj 50Hz. (La frekvenco estas 60Hz en la okcidenta parto de Japanio.) La formo de la elektra konektilo estas tiel

nomata “Formo A”, plata kaj dupolusa, kiel en Usono. Al eŭropanoj estas rekomendite kunporti adaptilon.

**Trafika regulo:** Aŭtoj iras sur la maldekstra flanko de vojo, kaj homoj piediras dekstre, same kiel en Britio kaj Aŭstralio.

**Transporto:** La plejparto de la hoteloj troviĝas en piedira distanco de la kongresejoj. En Jokohamo funkcias urbaj busoj kaj metrooj. Se vi volas ekskursi ekster la kadro de la kongresa programo, konsultu japanan kongresanon.

**Taksioj:** Por la unuaj 2km-oj 660 enoj, kun aldono de 80 enoj por ĉiu distanco de 250-300 metroj. Varia laŭ kompanio kaj grandeco de taksio. Ekde la 23-a horo ĝis la 5-a matene, oni devas aldoni 30 procentojn pli. Proksime de stacidomoj kaj hoteloj troviĝas atendejo de taksioj.

**Medikamentoj:** Se vi uzas preskribitan medikamenton, bonvolu kunporti kuracistan recepton en la latina, angla aŭ germana lingvo.

**Sanservoj:** Eksterlandanoj havu konfirmilon pri sanasekuro. Por eniri Japanion ne estas necesa vakcinado.

**Telefonado:** Prefikso por telefoni de ekster Japanio: +81 kaj kompleta telefonnumero minus la unua nulo de la regiona kodo. Prefikso por telefoni de Japanio eksteren: 001 + 010 + landa prefikso (001 estas kodo de firmao KDDI; vi povas uzi ankaŭ 0030, 0037 k.a.). Telefonbudoj ne estas multaj en Japanio. Rekomendinda estas telefonado en hoteloj kaj domoj. *Telefonnumeroj por urĝaĵoj:* Polico: 110. Ambulanco kaj fajrobrigado: 119. Aŭto-paneoj (aŭtomobila klubo JAF): 0570-00-8139 aŭ #8139.

**Interreto:** Page (100 enoj por 15 minutoj, ekzemple) aŭ senpage uzeblaj komputiloj ligitaj al Interreto troviĝas en preskaŭ ĉiuj hoteloj.

**Sekureco:** Kvankam Jokohamo estas unu el la grandaj urboj en la mondo, ĝi fieras pri sia sekureco. Vi vidos junajn virinojn promenantajn nokte sur stratoj. Konsilindas tamen ordinara singardemo kontraŭ poŝo- kaj mansako-ŝteloj precipe en vagonoj kaj stacidomoj. Rekomendindas havi vojaĝ-asekuron. LKK kaj UEA ne respondecas pri asekuro de la kongresanoj.

**Memoraĵoj:** Aparte menciindas meti-artaĵoj kaj elektronikaj produktaĵoj. En grandaj bazaroj de elektr(onik)aj aparatoj, ekzemple tiu en Akihabara (Tokio), troviĝas vendejoj senimpostaj por eksterjapaniaj turistoj.

**Trinkmono:** En restoracioj kaj hoteloj oni ne bezonas aldone pagi trinkmonon. Pagu nur la sumon fakturitan.

**Imposto:** La proporcio de aldonvalora imposto estas 5%. Plejofte la prezo indikita sur la varo inkluzivas la imposton, sed fojfoje ne.

# Loĝado en Jokohamo

**Ĝeneralaj kondiĉoj de mendoj.** La kondiĉoj de mendoj kaj malmendoj estas priskribitaj dorsflanke de la mendilo kaj plurloke en la Dua Bulteno. Mendante, ĉiu kongresano akceptas tiujn kondiĉojn. Estas konsilinde legi ilin antaŭ ol plenigi kaj sendi vian mendilon.

**Loĝdatoj.** Kiel unuan loĝdaton oni kalkulas la daton de la alveno al la hotelo (ekloĝo); se oni venas iam post noktomezo, kalkuliĝas la dato de la antaŭa tago. Kiel lastan daton oni kalkulas la daton de la forlaso de la hotelo (foriro; do, la daton de la lasta mateno en la hotelo).

**Eniro kaj eliro.** Principe, eblas okupi ĉambrojn post la tagmezo de la mendita dato, kaj necesas forlasi la ĉambrojn ĝis la tagmezo de la lasta tago. Se vi ne okupas ĉambron dum la unua mendita tago, oni kutime nuligas la rezervon, kaj vi perdas la plenan pagitan sumon por la tuta restadperiodo!

**Dulitaj ĉambroj kaj hazarda kunloĝigo.** La loĝiga servo ne povas aranĝi hazardan kunloĝigon de nekonatoj, pro kio dulitajn ĉambrojn oni disponigas *nur* al duopoj kiuj anticipe interkonsentis pri kunloĝado kaj menciis tion sur siaj mendiloj. Oni ĉiam fakturas la koston de plena ĉambro, eĉ se la kunloĝanto forestas dum iu(j) tago(j). Por faciligi al homoj kiuj nepre volas loĝi en dulitaj (aŭ plurlitaj) ĉambroj sed ne havas kunloĝanton, ĉe la retpaĝo de la kongreso (🌐http://www.uea.org/kongresoj/uk_2007.html) troveblas anonctabulo por tiu celo.

**Frueco de la mendo kaj alternativaj mendoj.** Ĉar la mendeblaj kapacitoj ne estas senlimaj, kaj precipe ĉar la kongreso okazas dum la turisma sezono, gravas mendi kiel eble plej frue, kaj ne eblas garantii la plenumon de la originala mendo ĉiam laŭ la preciza deziro de la mendanto. Tial ĉe ĉiu mendo oni nepre menciu ankaŭ alternativajn loĝvariantojn. En la retpaĝo de la kongreso eblas scii, kiuj hoteloj jam estas plenaj.

**Malfacilaĵo mendi tranoktojn ekde la 12-a de aŭgusto.** Ni rekomendas al tiuj kongresanoj, kiuj devas/volas mendi tranoktojn ekde la 12-a de aŭgusto (eĉ se temas nur pri plilongigo de la normala kongressemajna mendo) fari tion tre frue, ĉar je la 12-a de aŭgusto komenciĝas la japana feriperiodo. La mendo de hotelĉambroj fariĝas tre malfacila kaj UEA ne garantias lokojn en hoteloj ekde tiu dato.

**Pagoj.** La mendojn oni traktos nur post la ricevo de la koncerna pago.

**Ofertataj servoj.** La ĉambroj de la menciitaj hoteloj (ne de la gastejoj/studentejoj) havas telefonon, televidilon, klimatizilon, duŝejon (kelkaj ankaŭ bankuvon) kaj necesejon.

**Limdatoj.** La limdato por fari mendojn estas la 1-a de majo 2007. Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte, ĝis la 1-a de junio, kaj nepre kontraŭ aparta krompago (40 eŭroj). Pri malmendaj reguloj konsultu la dorsflankon de la mendilo.

**Loĝkonfirmo**. Minimume unu monaton antaŭ la UK vi ricevos konfirmon pri via loĝado, kun detalaj informoj pri via hotelo kaj aliaj kongresaj gravaĵoj.

La prezoj estas en eŭroj (EUR) por unu persono por unu nokto.

## Hoteloj kaj aliaj loĝebloj

La hoteloferto en Jokohamo estas tre varia kaj por ĉiaj buĝetoj. Tamen, ĝi ne estas senlima! Ĉefe la plej malmultekostaj loĝejoj havas malmulte da lokoj, ĉar temas pri etaj konstruaĵoj.

Krom per la papera mendilo sendita kun la papera Dua Bulteno, ankaŭ eblas mendi per la retpaĝo de la kongreso 🌐http://www.uea.org/kongresoj/uk_2007.html.

Por tiuj kongresanoj kiuj volas loĝi en dulita ĉambro sed ne jam havas kunĉambran(in)on ni disponigas la eblon trovi kunloĝanton pere de la kongresa retpaĝo.

Post kiam vi mendas, vi havas unu semajnon da tempo por ke la pago de la loĝejo estu plenumita. Post tiu tempo, se la pago ne atingas la Centran Oficejon de UEA aŭ la landan peranton, la mendoj estos nuligitaj.


Kelkaj hoteloj havas ĉambrojn por nefumantoj. Malgraŭ tio, ke ni provos mendi ĉiujn el tiuj ĉambroj, UEA ne garantias ke ĉiuj mendantoj ricevos ilin. Escepte de hotelo New Grand, ĉiuj hoteloj (ne la gastejoj) havas alliron al Interreto.

La matenmanĝo estas inkluzivigita en la prezo de la ĉambro, krom se alie indikite.






**1. Yokohama Grand Intercontinental Hotel**, 1-1-1 Minatomirai, Nishi-Ku. Luksa hotelo en la sama konstruaĵ-komplekso kiel la kongresejo, kun interna ligo al ĝi. Ĝia unika formo estas unu el la simboloj de la kvartalo Minatomirai. La hotelo havas i.a. ampleksajn ĉambrojn, restoracion, internan naĝejon, saŭnon kaj senfumajn ĉambrojn. *Loko en ĉambro: unupersona 180 EUR, dulita 125 EUR.*



**2. Pan Pacific Hotel Yokohama**, 2-3-7 Minatomirai, Nishi-ku. Luksa hotelo ĉ. 3 minutojn piede de la kongresejo. La hotelo havas i.a. restoracion, internan naĝejon, gimnastikejon, senpagan interretkonekton kaj senfumajn ĉambrojn. *Loko en ĉambro: unupersona 170 EUR, dulita 108 EUR.*



**3. Yokohama Royal Park Hotel**, 2-2-1-3 Minatomirai, Nishi-ku. Luksa hotelo ene de la plej alta turo en Japanio, ĉ. 10 minutojn piede de la kongresejo. La hotelo havas i.a. restoracion, internan naĝejon, gimnastikejon kaj senfumajn ĉambrojn. *Loko en ĉambro: unupersona 200 EUR, dulita 150 EUR.*



**4. Hotel New Grand**, 10, Yamashita-cho, Naka-ku. Luksa kaj tradicia hotelo, kiu jam gastigis diversajn gravulojn tra la jaroj. Ĝi situas ĉ. 15 minutojn metroe/piede de la kongresejo. La hotelo havas restoracion kaj senfumajn ĉambrojn. *Loko en ĉambro: unupersona 160 EUR, dulita 115 EUR.*



**5. Navios Yokohama**, 1-1, Shinko-2chome, Naka-Ku. Ĉarma hotelo por maristoj kaj ne-maristoj ĉ. 10 minutojn piede de la kongresejo. La hotelo havas restoracion kaj koktelkafejon. *Loko en ĉambro: unupersona 82 EUR, dulita 78 EUR.*



**6. Yokohama Bay Sheraton**, 1-3-23 Kitasaiwai, Nishi-Ku. Luksa hotelo el fama hotelĉeno troviĝas ĉ. 15 minutojn metroe/piede de la kongresejo. La hotelo havas i.a. internan naĝejon, restoracion, gimnastikejon kaj senfumajn ĉambrojn. *Loko en ĉambro: unupersona 125 EUR, dulita 109 EUR.*




**7. Yokohama Sakuraghi-cho Washington Hotel**, 1-1-67 Sakuragi-cho, Naka-ku. Luksa hotelo ĉe la trajnstacio Sakuraghi-cho de JR line (linio). La hotelo situas ĉ. 20 minutojn piede de la kongresejo kaj havas, i.a., retoracion, senpagan interretkonekton kaj senfumajn ĉambrojn. *Loko en ĉambro: unupersona 84 EUR, dulita 79 EUR.*




**8. Yokohama Excel Hotel Tokyu**, 1-1-12, Minamisaiwai, Nishi-ku. Luksa hotelo antaŭ la trajnstacio JR-Yokohama kaj ĉ. 10 minutojn metroe/piede de la kongresejo. La hotelo havas i.a. restoracion kaj senfumajn ĉambrojn. *Loko en ĉambro: unupersona 117 EUR, dulita 94 EUR.*




**9. Star Hotel Yokohama**, 11, Yamashita-Cho, Naka-Ku. Komforta hotelo ĉ. 15 minutojn metroe/piede de la kongresejo. Havas restoracion kaj senfumajn ĉambrojn. *Loko en ĉambro: unupersona 87 EUR, dulita 72 EUR.*




**10. Yokohama Isezakicho Washington Hotel**, 5-53, Chojamichi, Naka-ku. Komforta hotelo ĉ. 25 minutojn metroe/piede de la kongresejo. Havas i.a. larĝajn litojn, restoracion kaj senfumajn ĉambrojn. *Loko en ĉambro: unupersona 79 EUR.*




**11. Mandarin Hotel**, 4-170, Noge, Naka-ku. Komforta azistila hotelo ĉ. 25 minutojn piede de la kongresejo. Restoracio. *Loko en ĉambro: unupersona 77 EUR, dulita 68 EUR.*




**12. Hotel Cosmo Yokohama**, 9-1 Kitasaiwai 2 chome, Nishi-ku. Turisma kaj komforta hotelo ĉ. 20 minutojn metroe/piede de la kongresejo. La hotelo havas i.a. restoracion, senpagan interretkonekton kaj senfumajn ĉambrojn. *Loko en ĉambro: unupersona 77 EUR, dulita 63 EUR.*




**13. Camelot Japan**, 1-11-3, Kitasaiwai, Nishi-ku. Komforta hotelo ĉ. 20 minutojn metroe/piede de la kongresejo. Restoracio kaj senfumaj ĉambroj. *Loko en ĉambro: unupersona 77 EUR, dulita 63 EUR.*




**14. San Ai Yokohama**, 3-95 Hanasaki-cho, Naka-ku. Komforta hotelo ĉ. 20 minutojn piede de la kongresejo. Restoracio kaj senfumaj ĉambroj. *Loko en ĉambro: unupersona 69 EUR, dulita 61 EUR.*



**15. Heiwa Plaza Hotel**, 5-65, Ohtacho, Naka-ku. Komforta hotelo ĉ. 10 minutojn metroe/piede de la kongresejo. Restoracio kaj senfumaj ĉambroj. *Loko en ĉambro: unupersona 66 EUR, dulita 62 EUR.*



**16. Apa Hotel Yokohama Kannai**, 3-37-2 Sumiyoshi-cho, Naka-ku. Komforta hotelo ĉ. 15 minutojn metroe/piede de la kongresejo. Ĝi havas i.a. restoracion, saŭnon, senpagan interretkonekton kaj senfumajn ĉambrojn. *Loko en ĉambro: unupersona 78 EUR.*



**17. Comfort Hotel Yokohama Kannai**, 3-33 Sumiyoshi-Cho, Naka-Ku. Komforta hotelo ĉ. 15 minutojn metroe/piede de la kongresejo. Ĝi havas i.a. restoracion, senpagan interretkonekton kaj senfumajn ĉambrojn. *Loko en ĉambro: unupersona 65 EUR, dulita 53 EUR.*

**18. Escale Yokohama**, 184 Yamashita-cho, Naka-ku. Simpla, sed komforta marista hotelo kun japanstilaj (tatama ĉambro, privata necesejo kaj komuna duŝejo – viroj kaj virinoj aparte!) kaj okcidentstilaj ĉambroj (enĉambraj duŝejo kaj necesejo). Matenmanĝo ne inkluzivigita. Ĝi situas ĉ. 15 minutojn metroe/piede de la kongresejo. *Loko en ĉambro okcidentstila: unupersona 56 EUR, dulita 48 EUR. Loko en ĉambro japanstila: dulita 36 EUR, kvarlita 31 EUR, kvinlita 35 EUR.*

**19. Kanagawa Junulargastejo**, 1 Momijigaoka, Nishi-ku. La junulargastejo situas je 150 metroj de la Gubernia Muzikhalo, kie okazos artaj aranĝoj, kaj ĉ. 20 minutojn piede de la kongresejo. Viroj kaj virinoj dormas kaj duŝas sin aparte (komunaj duŝejoj). En la junulargastejo ne estas klimatiziloj kaj ne estas servata matenmanĝo. Tie estas interretkonekto. Ne estas permesate resti en la ejo inter la 10h00 kaj la 15h00 pro purigado. Je la 23h00 la eksteraj pordoj fermiĝas kaj malfermiĝas je la 7h00 en la sekva tago. *Loko en plurlita ĉambro: 21 EUR.*

**20. Yokohama Gasteja Vilaĝo (Jokohama Hostel Village)**, 3-11-2 Matsukage-cho, Naka-ku. La vilaĝo, kiu iam gastigis havenlaboristojn, konsistas el tatamo-dormĉambroj en kelkaj konstruaĵoj, transformitaj en turistajn dormĉambrojn. La etaj ĉambroj (4-5 $m^2$) havas klimatizilon, televidilon kaj faldeblan matracon surplanke. La duŝejoj (aparte pagotaj), necesejoj kaj kuirejoj estas komunaj en ĉiuj konstruaĵoj. La enregistriĝo devas okazi inter la 15h00 kaj la 20h00 – ne eblas enregistriĝi post la 20h00! Post la enregistriĝo la ĉambroj restas 24 horojn/tage alireblaj. Ne estas servata matenmanĝo. La vilaĝo situas ĉ. 25 minutojn trajne/piede de la kongresejo. Eblas mendi *nur* ekde la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto, minimume 5 tagojn. *Loko en ĉambro: unupersona 21 EUR, dupersona 16 EUR.*

**21. Amasloĝejo.** Por ricevi informojn pri la amasloĝejo, bv. kontakti la loĝigan servon de LKK: retadreso 🖳logxejo92@gmail.com; poŝtadreso SUZUKI Keiichiro, Hutoo-cho 405, Kouhoku-ku, Yokohama, 222-0031, Japanio.

# Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj

Japanio estas granda lando, sed, bonŝance, la plej belaj kaj interesaj vizitindaj lokoj troviĝas bone ligitaj kaj kun rapidaj konektoj al Jokohamo. Niaj proponoj de tri antaŭ- kaj du postkongresaj ekskursoj estis zorge faritaj pensante pri la komunaj interesoj de la ekskursanoj, pri belecoj de la lokoj vizitotaj, kaj pri servoj ekonomiaj kaj kvalitaj.

La antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj inkluzivas:

– restadon en kvalitaj hoteloj similaj al 3- aŭ 4-stelaj;
– matenmanĝojn en la hoteloj;
– tagmanĝojn kaj, *nur* se indikita ĉe la ekskurspriskribo, ankaŭ vespermanĝojn;
– transporton dum la ekskurso en altkvalitaj klimatizitaj aŭtobusoj;
– enirbiletojn por la vizitotaj lokoj;
– Esperantajn ĉiĉeronojn.

La ekskursoj *ne* inkluzivas:

– ekstrajn elspezojn en la hoteloj, ekz. telefonvokojn;
– trinkaĵojn dum la manĝoj;
– transporton de/al la flughavenoj (krom kiam la ekskurso ekstartas en la flughaveno; en kazo de alveno al la urbo tago(j)n antaŭ la ekskurso, la homoj mem devas zorgi pri transporto de la hotelo al la flughaveno por renkontiĝi kun la grupo);
– san-/vojaĝasekuron.

Ĉiuj ekskursoj devas havi minimume 30 partoprenantojn. Se estos malpli ol 30 partoprenantoj en iuj ekskursoj, tiam la prezoj altiĝos *aŭ la koncernaj ekskursoj estos nuligitaj*. En tiaj okazoj la partoprenontoj estos ĝustatempe informitaj pri tio kaj povos ŝanĝi al alia aŭ entute nuligi la ekskurson.

Ĉiuj ekskursoj povas havi maksimume 45 partoprenantojn. Bv. frue mendi por garantii vian lokon en la ekskurso.




## Vizitotaj urboj kaj vidaĵoj



**Kiyomizu-Templo** estas unu el la plej famaj temploj en Kioto, fondita en 807 kaj rekonstruita en 1633. El ĝiaj larĝaj lignaj fenestroj eblas havi panoraman vidon sur la urbo. Ĝi estas la origino de la japana proverbo "salti el Kiyomizu-verando", kiu signifas, ke oni decidas ekfari ion.

**Kyoto Studio-Parko.** Toei Uzumasa Eigamura estas tema parko dediĉita al la konservo kaj disvolviĝo de la japana kinkulturo. Ĝiaj spektakloj kaj vidindaĵoj estas tre popularaj inter japanaj kaj eksterlandaj turistoj.



**Todaiji-Templo, Daibutsuden** kaj **Nigatsu-do-Halo.** Todaiji (Granda Orienta-Templo) estas unu el la plej famaj kaj historie gravaj temploj en Japanio kaj simbolo de la urbo Nara. Ĝi estis konstruita en 752 kiel ĉeftemplo de ĉiuj provincaj budhaj temploj. Todaiji ne nur enhavas la plej grandan budhan statuon en Japanio sed estas la plej granda ligna konstruaĵo en la mondo. Imagu ke la nuna konstruaĵo, el 1692, estas nur du trionoj de la originala templo. Nigatsu-do-Halo estis nomumita japana nacia trezoro en decembro 2005. Ĝia nomo devenas el tradicia ceremonio okazigata en la halo en februaro.




**Wakakusayama-Montoj.** La Wakakusayama, vulkanŝtonaj montoj ĉe malnova vulkano, altas ĉirkaŭ 342 m. La rondaj tri montopintoj kovritaj de herboj ĉarmas la homojn jam de multaj jaroj. Ĉe la pinto de Wakakusa-yama estis konstruita la malnova tombo Uguisuduka en la 5-a jarcento. La vidaĵo el la monto al Nara estas neforgesebla.



**Kasuga-Sanktejo.** Kasuga Taisha estas la plej renoma sanktejo en la urbo Nara. Ĝi estis konstruita samtempe kiam la ĉefurbo estis konstruita kaj dediĉita al la diaĵo protektanta la urbon. Kasuga Taisha estis ankaŭ la protekta sanktejo de Fujiwara, la plej pova japana klano de la Nara- kaj Heian-periodoj.



**Kinkakuji-Templo** (Ora Pavilono) estas Zen-templo antaŭe konata kiel Rokuonji. En 1397 oni ekkonstruis la Oran Pavilonon kiel parton de nova domo por la emerita ŝoguno Ashikaga Yoshimitsu. Post lia morto en 1408 la loko iĝis Zen-templo. La loko, kovrita de oraj folioj, funkcias kiel sanktejo kaj havas sanktajn relikvojn de Budho.



**Ginkakuji-Templo** (Arĝenta Pavilono), antaŭe konata kiel Tozan Jishoji, estas Zen-templo ĉe la bazo de Higashiyama (orientaj montoj). En 1482 ŝoguno Ashikaga Yoshimasa konstruis sian emeritan domon sur la grundo de la nuna

templo. Kelkajn jarojn poste estis konstruita la Arĝenta Pavilono laŭ la modelo de la Ora Pavilono, sed la kovrado de muroj per arĝento neniam realiĝis.



**Tenryuji-Templo** estas Zen-templo konstruita en 1339 kaj poste elektita la unua inter la kvin plej gravaj Zen-temploj en Kioto. La nuna konstruaĵo estas de la Meiji-periodo. La unika ĝardeno estas konsiderata la plej malnova de sia speco. En 1995 Unesko deklaris Tenryuji monda heredaĵo.

**Arashiyama** estas ĉarma turisma distrikto apud Kioto. La ĉefaj vidindaĵoj estas la fama ligna (nun parte betona) ponto Togetsukyo kaj la arbaro de la monto Arashiyama en la fono.



La **Pacmemor-Parko** estis konstruita por celebri la falon de la atombombo super Hiroŝimo en la 6-a de aŭgusto 1945 kaj por instigi pacan mondon. Ĝi situas apud la epicentro de kie falis la bombon. Inter la multaj monumentoj rilate al tiu evento tie troviĝas ankaŭ la Pacmemor-Muzeo.




La **Pacmemor-Muzeo** montras la hororan efikon, kiun la atombombo kaŭzis al la urbo kaj ĝiaj enloĝantojn. La vizito certe ne estas gaja evento. Tie ankaŭ videblas la militarisma pasinteco de Japanio kaj la tuta proceso kiu kulminis en la bombardo de la urbo.



**Miyajima-Insulo** estas konsiderata sankta insulo (ĝia nomo signifas tion) kaj loko kun unu el la tri plej belaj vidaĵoj en Japanio. Ĝi estas plej fama pro la Itsukushima-Sanktejo, konstruita en la 6-a jarcento, kiu kune kun sia larĝa ligna pordego restas super la oceana akvo dum altaj tajdoj. Ĝi estis la ĉefa sanktejo de la pova Taira-klano. Cervoj moviĝas tute liberaj sur la insulo kaj simioj same faras sur la supro de la plej alta monto, Misen.



**Korakuen-Parko** estas konsiderata unu el la tri plej belaj ĝardenoj en Japanio. Ĝi estis konstruita en la 17-a jarcento ordone de lokaj feŭdaj estroj, kaj havas lagetojn, te-domojn, pavilonojn, lignaĵojn, artefaritan monteton, diversajn etajn sanktejojn kaj ampleksajn herbejojn. Apud la parko troviĝas la Okayama Kastelo.



**Himeji-Kastelo** estas konsiderata la plej bela kastelo en Japanio. Male ol la aliaj japanaj kasteloj, Himeji-Kastelo neniam estis detruita dum militoj, tertremo aŭ fajroj kaj restas laŭ sia origina formo. Ĝi estas kaj nacia monumento kaj Uneska monda heredaĵo. En la 14-a jarcento estis konstruita fortikaĵo ĉirkaŭ la kastelo, kiu pligrandiĝis laŭ

la jarcentoj fare de la diversaj klanoj kiuj regis en la regiono. La fascina kastelo-komplekso, kun la nuna formo, estis finfarita en 1609.



**Otani** (**Ooya**) **Kannon-Templo** estis konstruita en 810. Laŭ onidiroj ĝi estis fondita de Kukai, historie grava pastro de la Heian-erao. La templo famas ankaŭ pro la granda Budho (26,93 m) kiu estis konstruita post la Dua Mondmilito por celebri pacon. El ĝia brusto, kie estas rigardejo, eblas havi panoraman vidon sur la urbo Utsunomiya.

**Toshogu-Sanktejo** estas maŭzoleo de Tokugawa Ieyasu, la fondinto de la Tokugawa ŝoguna dinastio, kiu regis Japanion pli ol 250 jarojn ĝis 1868. Origine modesta, la Toshogu-Maŭzoleo estis pligrandigita dum la 17-a jarcento ĝis la impresa komplekso kun dekoj da ŝintoaj kaj budhistaj temploj situantaj ene de belega arbaro.



**Kegon-Akvofalo** estas la plej fama akvofalo inter la 48 ekzistantaj en Nikko. La akvo falas 97 metrojn ĉirkaŭita de belega naturo. Ĝi estas unu el la tri plej belaj akvofaloj en Japanio.


**Rin-Noji-Templo** estas la plej grava templo en Nikko. Ĝi estis fondita de Shodo Shonin, la budha monaĥo kiu enkondukis budhismon en Nikko.

**Chuzenji-Lago** (Chuzenjiko) estas bela arbara lago ĉe la bazo de la sankta vulkano Nantai-Monto en la Nacia Parko de Nikko.




**Nikko-Edo-Mirlando** estas tema parko, ankaŭ uzata por surscenigo de antikvaj dramoj kaj filmado de historiaj filmoj. Krom la ekscitaj spektakloj ankaŭ eblas mem produkti malnovstilajn ludilojn kaj manĝi tiuepokajn manĝaĵojn. Por tiuj kiuj volas, eblas lui malnovajn kostumojn.

**Ryuokyo** estas eksterordinara valo formita pro la erozio de la Kinugawa-Rivera akvo en la vulkanaj rokoj. La valo memorigas al moviĝanta drako ĉe la riverbordoj.



**Edo-Tokio-Muzeo** estas la loko kie la vizitantoj povas lerni pri la historio kaj kulturo de Tokio, ekkompreni la nuntempan urbon, kaj vidi la projektojn pri la estonto de la metropolo. Tie troviĝas diversaj artaĵoj, manlaboriloj kaj aliaj objektoj de diversaj epokoj, kelkaj originaloj, kelkaj perfektaj reproduktaĵoj.




**Sensoji** (**Asakusa-Kanonn-Templo**) estas budhista templo en la centro de la kvartalo Shitamachi (Malalta Urbo), fama pro la fakto ke la statuo de diino Kannon, trovita de du frataj fiŝistoj en 628 en la rivero Sumida, eĉ post oftaj

reĵetoj en la riverajn akvojn daŭre revenis al ili. La templo, la plej malnova en Tokio, estis finkonstruita en 645.



**Kaminarimon (Kaminari-Pordego)** estas la unua de du pordegoj ĉe la eniro de la Sensoji-Templo. Konstruita antaŭ pli ol 1000 jaroj ĝi estas la simbolo de Asakusa.

**Ameyoko-Aĉetstrato** estas vigla komerca strato en Tokio. La bazarstila strato estis loko de nigra merkato tuj post la Dua Mondmilito. Ameyoko estas mallongigo de Ameya Yokocho (dolĉaĵeja strato), ĉar tie vendiĝis multe da tia varo.



**Meiji-Ŝinto-Sanktejo** estas dediĉita al la spiritoj de la imperiestro Meiji kaj lia edzino, la imperiestrino Shoken. La ejo estis konstruita en 1920 kaj rekonstruita post sia detruo dum la Dua Mondmilito. Ĝi situas apud la bela parko Yoyogi kaj dum la tuta jaro okazas en ĝi diversaj festoj.

**Mashikoyaki-ceramikaĵoj.** Mashiko estas konata pro siaj ceramikaĵoj nomataj Mashikoyaki. Fruaj ceramikaĵoj en Mashiko estas de la Jomon- kaj Yayoi-periodoj. Malgraŭ la kutima penso ke la ceramikaĵoj de Mashiko estas ĉefe brunaj kaj havas rustikan dezajnon, la nuntempaj estas en diversaj stiloj, koloroj kaj en tre kreivaj manieroj faritaj.



**Tokio-Turo** estas 333-metra, 9 metrojn pli alta ol ĝia modelo la Eiffel-Turo en Parizo, kaj ĝi ankaŭ estas la plej granda ŝtala turo sen aparta apogo krom la propraj bazoj. Ĝi estis finkonstruita en 1958 kiel simbolo de la ekonomia renaskiĝo de Japanio kaj uzata de televid- kaj radistacioj por dissendi siajn programojn, krom ankaŭ esti turisma allogaĵo de Tokio.


**Kairakuen-Parko** estas konsiderata unu el la tri plej belaj ĝardenoj en Japanio, ĉefe dank' al siaj pli ol tri mil prunarboj. Ĝi estas relative nova, konstruita en 1841 laŭ mendo de la loka reganto Tokugawa Nariaki. Male ol la aliaj du plej belaj parkoj en Japanio (Korakuen kaj Kenrokuen), Kairakuen dekomence estis malferma ne nur al la regantoj sed ankaŭ al la tuta popolo. Ĝia nomo signifas "parko por esti ĝuata komune".



La sidejo de la **Nacia Dieto** (Parlamento) estas la loko kie la du leĝdonaj ĉambroj kunsidas. Ĝi estis finkonstruita en 1936 kaj plene farita el nur japanaj materialoj.




**Nijubashi**, la duobla ponto, estas la ĉefa enirejo al la imperiestra palaco kaj malfermiĝas nur en tre gravaj okazoj, kiel ekzemple dum la imperiestra naskiĝtago kaj novjaro. Ĝi estas tre vizitata loko en Tokio.



**Akihabara** (mallonge: Akiba) estas strato konata pro siaj elektronikaj vendejoj. En la lastaj jaroj la regiono famiĝis ankaŭ pro tio, ke ĝi iĝis centro de vendado de Mangaj-historioj, komputilludoj kaj animadaj filmoj.

**Asakusa** estas la centro de Shitamachi, laŭlitere "malalta urbo", unu el la malmultaj kvartaloj de Tokio kiu konservis apartan etoson de la malnova Tokio. Ĝi estas facile vizitata piede, sed se vi deziras, vi povas ankaŭ lui iun ĵinrikŝon (veturilon tiratan de homo).



**Ginza** estas la plej fama altklasa aĉet- kaj manĝloko en Tokio, kie abundas diversaj aĉetmagazenoj, vestaĵvendejoj, artgalerioj, restoracioj, noktaj kluboj kaj kafejoj.

# Antaŭkongresaj ekskursoj

## A1 Kioto kaj Nara

*1-a – 3-a de aŭgusto, 3 tagoj/2 noktoj*

---

01.08 Alveno al Kansai-Flughaveno, kie la ekskurso komenciĝos. Renkontiĝo je la 10h00 en la kvara etaĝo de la flughaveno, ĉe la akceptejoj numeroj 29 kaj 30 de grupaj ekskursoj (inter la giĉetovicoj D kaj E). Je la 12h15 la aŭtobuso prenos ĉe la hotelo tiujn ekskursanojn kiuj mendis ekstra(j)n nokto(j)n. Ekskurso en Kioto al la Kiyomizu-Templo, Kioto Studio-Parko kaj lunĉo. Restado en Kyoto Shin-Hankyu Hotel (adreso: Shiokoji-dori Shimogyou-ku, antaŭ la stacio Kyoto, 2 minutoj de la stacio JR Kyoto; telefono 81-75-343-5300).

02.08 Ekskurso al Nara, kie ni vizitos Todaiji-Templon, Daibutsuden, Nigatsu-do-Halon, Wakakusayama-Monteton, Kasuga-Sanktejon kaj lunĉos. Reveno al la hotelo en Kioto.

03.08 Ekskurso en Kioto al la Kinkakuji-Templo (Ora Pavilono), Ginkakuji-Templo, Arashiyama, Tenryuji-Templo. Lunĉo. Ekvojaĝo al Jokohamo pere de la tre altrapideca "kugla" trajno Shinkansen. Alveno je la 19h00. Fino de la servoj.

**Prezoj:** Loko en ĉambro: unupersona 650 EUR, dulita 590 EUR.

**Ekstra nokto en Kyoto Shin-Hankyu Hotel:** unupersona 77 EUR, dulita 55 EUR.

## A2 Hiroŝimo, Miyajima kaj Kioto

*31-a de julio – 3-a de aŭgusto, 4 tagoj/3 noktoj*

31.07 Alveno al la internacia flughaveno de Tokio, Narita, renkontiĝo je la 7h10 en terminalo 1, suda alo, kvara etaĝo ĉe giĉetvico K, numeroj 12 kaj 14. Vojaĝo al Hiroŝimo pere de la altrapideca "kugla" trajno Shinkasen. Enhoteliĝo en Sunroute Hotel Hiroshima (adreso: 3-3-1 Ote-machi, Naka-ku; ☎+81-82-249-3600) kaj ekskurso en Hiroŝimo al la Pacmemor-Parko kaj -Muzeo. Lunĉo.

01.08 Ekskurso al la insulo Miyajima, kie ni vizitos la Itsukushima-Sanktejon kaj lunĉos. Poste ni iros al la urbo Kurashiki. Enhoteliĝo ĉe la Kurashiki Ivy Square Hotel (adreso: 7-2 Honmachi; ☎+81-86-422-0011).

02.08 Ekskurso al Himeji-kastelo en Himeji kaj la Korakuen-parko en Kurashiki, lunĉo kaj ekvojaĝo al Kioto. Enhoteliĝo ĉe Kyoto Shin-Hankyu Hotel (adreso: Shiokoji-dori Shimogyou-ku, antaŭ la stacio Kyoto; ☎+81-75-343-5300).

03.08 Ekskurso en Kioto al la Kinkakuji-Templo, Ginkakuji-Templo kaj Kiyomizu-Templo. Lunĉo. Vojaĝo al Jokohamo per Shinkansen. Alveno je la 19h00. Fino de la servoj.

**Prezoj:** Loko en ĉambro: unupersona 961 EUR, dulita 890 EUR.

**Ekstraj noktoj en Narita, Narita Airport Rest House** (Narita International Airport, Narita-city,Chiba; ☎0476-32-1212): Unupersona 73 EUR, dulita 53 EUR.





## **A3** Nikko kaj Utsunomiya

*1-a – 3-a de aŭgusto, 3 tagoj/2 noktoj*

---

01.08 Alveno al la internacia flughaveno de Tokio, Narita, renkontiĝo je la 8h00 en terminalo 1, suda alo, kvara etaĝo ĉe giĉetovico K, numeroj 12 kaj 14. Ekveturo al Utsunomiya kaj vizito al la Otani Kannon-Templo. Lunĉo kaj daŭrigo al Nikko, enhoteliĝo en Nikko Lakeside Hotel (adreso: 2482, Chugushi; ☎+81-28-855-0321). Vespermanĝo.

02.08 Ekskurso en Nikko al la Toshogu-Sanktejo, Rin-Noji-Templo, Chuzenji-Lago kaj Kegon-Akvofaloj. Lunĉo kaj vespermanĝo.

03.08 Ekskurso en Nikko al Ryuokyo kaj Edo-Mirlando. Lunĉo kaj transporto al Jokohamo. Alveno je la 19h00. Fino de la servoj.

**Prezoj:** Loko en ĉambro: unupersona 720 EUR, dulita 640 EUR.

**Ekstraj noktoj en Narita, Narita Airport Rest House** (Narita International Airport, Narita-city,Chiba; ☎0476-32-1212): unupersona 73 EUR, dulita 53 EUR.

# Postkongresaj ekskursoj

## P1 Tokio, Nikko kaj Mito

*12-a – 15-a de aŭgusto, 4 tagoj/3 noktoj*

---

12.08 Matena forveturo de la kongresejo al Tokio, kie ni vizitos la Edo-Muzeon, la Asakusa-Kannon-Templon, Kaminarimon-Pordegon kaj Arcade-Aĉetejon, kaj krozos la riveron Sumida. Lunĉo. Enhoteliĝo en Shinjuku Washington Hotel (adreso: 3-2-9 Nishi-Shinjuku, Shinjuku-ku, Tokio; ☎+81-33-343-3111).
13.08 Ekskurso en Tokio al la Meiji-Ŝinto-Sanktejo, Tokio-Turo, Nacia Parlamento, Imperia Palaco-Placo, Akihabara kaj Ameyoko-Aĉet-centro. Lunĉo.
14.08 Vojaĝo al Nikko, kie ni vizitos la Toshugu-Sanktejon kaj Rin-Noji-Templon. Lunĉo kaj enhoteliĝo en Utsunomiya Tobu Hotel Grande (adreso: 5-12 Honcho, Utsunomiya-shi, Tochigi; ☎+81-28-627-0111).
15.08 Vojaĝo al Mito, kie ni vizitos la Mashikoyaki-Ceramikaĵejon kaj Kairakuen-Parkon. Lunĉo, forveturo, alveno al Tokio (JR Tokyo Station je la 19h00) kaj fino de la servoj.

**Prezoj:** Loko en ĉambro: unupersona 785 EUR, dulita 645 EUR.

**Ekstraj noktoj en Shinjuku Washington Hotel, Tokio**: unulita 95 EUR, dulita 59 EUR.

## P2 Tokio

*12-a – 14-a de aŭgusto, 3 tagoj/2 noktoj*

---

12.08 Ekveturo de la kongresejo al Tokio, kie ni vizitos la Tokio-Turon, Nacian Parlamenton, Imperiestran Palaco-Placon, Akihabara kaj Ginza. Lunĉo kaj enhoteliĝo en Shinjuku Washington Hotel (adreso: 3-2-9 Nishi-Shinjuku, Shinjuku-ku, Tokio; ☎+81-33-343-3111).
13.08 Ekskurso en Tokio al la Meiji-Ŝinto-Sanktejo, Asakusa-Kannon-Templo, Edo-Tokio-Muzeo kaj Ueno-Parko. Lunĉo.
14.08 Tago libera. Fino de la servoj.

**Prezoj:** Loko en ĉambro: unupersona 495 EUR, dulita 415 EUR.

**Ekstraj noktoj en Shinjuku Washington Hotel, Tokio**: unulita 95 EUR, dulita 59 EUR.

# Dumkongresaj ekskursoj

**Kiel mendi ekskursojn?**
Bonvolu atente tralegi la priskribojn kaj elekti. Post la elekto, plenigu klare kaj atente (preslitere) la koncernan parton de la mendilo, kaj sendu ĝin samtempe kun via pago al Roterdamo (japanoj al la japana peranto). Se en via lando estas kongresa peranto, vian mendon kaj pagon vi povas sendi al li aŭ ŝi. Por malmendoj validas la kondiĉoj presitaj dorsflanke sur la mendilo. Bv. ĉiam sendi la mendilon kaj pagon al la sama adreso, t.e. instanco.

**Ĝeneralaj kondiĉoj**
Ĉar ĉiuj ekskursoj dependas de minimumo da partoprenantoj, la organizanto rezervas al si la rajton eventuale nuligi iujn ekskursojn, pri kio ni klopodos averti vin kiel eble plej frue antaŭ la kongreso, kun propono de eblaj alternativoj.

Ĉiuj ekskursoj startas de antaŭ la kongresejo, ĉe la unua etaĝo, kaj revenas tien. Klopodu veni dek kvin minutojn antaŭ la indikita starthoro de la ekskurso. Ĉiujn ekskursojn akompanos esperantlingvaj interpretistoj. Ili ne estas profesiaj ĉiĉeronoj sed nur bonvolaj helpantoj. Bv. indulgi ilin per pacienco kaj samideana komprenemo. Ili faros sian plejeblon por bone servi al vi. Ĉiuj prezoj estas en eŭroj (EUR).

Kun la kongresaj dokumentoj ĉiuj mendintoj ricevos koverton kun la menditaj kongresaj biletoj. Sur la biletoj estos bazaj informoj pri la ekskurso (dato, horo, buso), kiuj eventuale povos malsami ol tiuj presitaj en la Dua Bulteno. Kaze de malsameco validas la informoj sur la biletoj. Ne forgesu preni ŝirmilojn kontraŭ suno kaj varmo! Bv. noti ke la tereno en kelkaj ekskursoj povas esti netaŭga por homoj kun marŝhandikapoj. La priskriboj de la ekskursoj kutime mencias tion.

**Servoj inkluzivigitaj**
– ĉiĉeronado de loka turisma servo kaj esperantlingva ĉiĉerono;
– vojaĝo per altnivelaj aŭtobusoj (tamen ne kiam temas pri piedira aŭ publiktransporta ekskurso);
– enirbiletoj de la vizitataj lokoj (krom se alie indikita); kaj
– lunĉskatolo kun sandviĉo kaj minerala akvo (nur por la tuttagaj ekskursoj).

**Ni rekomendas** al la partoprenantoj de la dumkongresaj ekskursoj porti komfortajn ŝuojn, leĝerajn vestaĵojn, sunprotektan kremon kaj sunŝirmilon (ĉapon, sunombrelon aŭ simile).

# Tuttagaj ekskursoj

La tuttagaj ekskursoj okazos precipe en merkredo, la 8-a de aŭgusto, sed ankaŭ en aliaj tagoj. La prezoj inkluzivas lunĉskatolon. Ĉiuj ekskursaj aŭtobusoj estas altkvalitaj kaj klimatizitaj, krom se temas pri publikaj transportiloj.

## E1 Tokio – Edo – Ueno – Bazaroj

*Mardo kaj merkredo* *Ekiro: 8h30* *Reveno: ĉ. 19h30* *Prezo: 58 EUR*

La unua vizitata loko estas la Edo-Tokyo-Muzeo, kie la vizitantoj povos lerni pri la historio kaj kulturo de Tokio, ekkompreni la nuntempan urbon, kaj vidi la projektojn pri la estonto de la metropolo. Tie troviĝas diversaj artaĵoj, manlaboriloj kaj aliaj objektoj de diversaj epokoj, kelkaj originaloj kaj kelkaj perfektaj reproduktaĵoj. La ekskurso plu iras al la belega parko Ueno, kiu malfermiĝis al la popolo en la jaro 1873. En ĝi troviĝas multaj vidindaĵoj, interalie statuo de Saigo Takamori, grava persono de la periodo inter la fino de la Edo- kaj komenco de la Meiji-periodoj, kiu helpis starigi la Meiji-epokon en 1868. Sekve la ekskurso portos vin al du famaj lokoj por aĉetado en Tokio. La unua estas la aĉetstrato Ameyoko. La bazarstila strato estis loko de nigra merkato tuj post la Dua Mondmilito. Ameyoko estas mallongigo de Ameya Yokocho (dolĉaĵeja strato), ĉar tie vendiĝis multe da tiaj varoj. La alia loko estas Akihabara (mallonge: Akiba), konata pro siaj elektronikaj vendejoj. En la lastaj jaroj la regiono famiĝis ankaŭ pro tio, ke ĝi iĝis centro de vendado de Mangaj-historioj, komputilludoj kaj animadaj filmoj.



# E2 Tokio – Tocho – Nacia Dieto – Sensoji – Nakamise – Nijubashi

*Lundo kaj merkredo* *Ekiro: 8h30* *Reveno: ĉ. 17h30* *Prezo: 55 EUR*



La ekskurso unue iras al la 243-metrojn-altaj ĝemelturoj kaj apudaj konstruaĵoj, kiuj formas la metropolan registarejon de Tokio (Tocho). En la 45-a etaĝo de ambaŭ turoj troviĝas rigardejo kun belega vido al la urbego. La sekva loko vizitota estas la sidejo de la Nacia Dieto, parlamentejo finkonstruita en 1936 kaj plene farita el nur japanaj materialoj. Poste la ekskurso gvidos al la Sensoji-Templo (Asakusa Kannon), budhisma templo en la centro de la kvartalo Shitamachi (Malalta Urbo), fama pro la fakto ke la statuo de la diino Kannon, trovita de du frataj fiŝistoj en 628 en la rivero Sumida, eĉ post oftaj reĵetoj en la riverajn akvojn daŭre revenis al ili. La templo, la plej malnova en Tokio, estis finkonstruita en 645. La ekskurso pluiras al la tuj apuda aĉetstrato Nakamise, kie abundas japanaj suveniroj (vd. foton, p. 21). Fine estos vizitata Nijubashi, la duobla ponto ĉe la imperiestra palaco. Ĝi estas la ĉefa enirejo al la imperiestra palaco kaj malfermiĝas nur en tre gravaj okazoj, kiel la imperiestra naskiĝtago kaj novjaro.



## E3 Meiji Shinto – Toyota – Hamarikyu – Nijubashi

*Merkredo* *Ekiro: 8h00* *Reveno: ĉ. 18h00* *Prezo: 59 EUR*

La unua vizitota loko estas la sanktejo Meiji Jingu, dediĉita al la spiritoj de la imperiestro Meiji kaj lia edzino, la imperiestrino Shoken. La ejo estis konstruita en 1920, kaj rekonstruita post sia detruo dum la Dua Mondmilito. Ĝi situas apud la bela parko Yoyogi, kaj dum la tuta jaro okazas en ĝi diversaj festoj. La ekskurso sekve iras al Odaiba Aria Toyota-Montrejo, loko kie evidentiĝas la graveco de Universala Dezajno, dezajno kiu provas minimumigi la diferencojn inter la manieroj laŭ kiuj diversaj individuoj uzas la produktojn. Poste estas tempo por iri al unu el la plej belaj ĝardenoj de Tokio, Hamarikyu. Ĝi estas la ĝardeno de feŭda sinjoro el la Edo-periodo, troviĝante apud la futurisma kvartalo Shiodome. Fine estos vizitata Nijubashi, la duobla ponto ĉe la imperiestra palaco. Ĝi estas la ĉefa enirejo al la imperiestra palaco kaj malfermiĝas nur en tre gravaj okazoj, kiel la imperiestra naskiĝtago kaj novjaro.

## E4 Kawasaki

*Merkredo* *Ekiro: 8h00* *Reveno: ĉ. 18h00* *Prezo: 62 EUR*



Tiu ĉi ekskurso iras al Nihon Minka-En, fascina subĉiela muzeo kun amasoj da tradiciaj popolaj domoj kiuj aĝas inter 200 kaj 300 jarojn. Ĝi estas unu el la plej grandaj muzeoj de popolaj domoj en Japanio. Inter la 25 konstruaĵoj en la parko, 7 estas konsiderataj kiel grava kultura propraĵo fare de la japana registaro. Sekve la ekskurso iras al la Taro Okamoto-Muzeo, kie estos montrataj la diversaj artaĵoj faritaj de Okamoto, kaj pere de ili eblos kompreni la proceson uzatan de li por kompletigi la pentraĵojn ene de sia mempensita temo “Kompreni la trajtojn de la vivo ene de si mem”. Fine estos vizitata la Parko Yamashita, de kie eblas havi romantikan vidon al la havena ponto kaj haveno kun la diversaj ŝipoj kiuj trairas ĝian akvon. En la parko videblas ankaŭ kelkaj interesaj kulturinterŝanĝoj, kiel ekzemple la statuoj “La knabino kun la ruĝaj ŝuoj” kaj “La akvogardisto”, tiu ĉi lasta donacita de urbo San Diego en Usono, kaj la “Hinda akvofontano”.

# E5 Kamakura

*Merkredo kaj ĵaŭdo* *Ekiro: 9h00* *Reveno: ĉ. 19h00* *Prezo: 65 EUR*



La unua vizitota loko estas la templo Engakuji, kiu estas la plej granda Engakuji-skola templo de la sekto Rikai de Zen-budhismo. Ĝi estas la dua templo el la kvin plej grandaj temploj de Zen en Kamakura. La templo estis fondita en 1282, unu jaron post kiam la dua invado de la mongoloj estis haltigita. Sekve la ekskurso iras al la plaĝoj de Yuigahama, kiuj, belaj kaj famaj, pleniĝas dum la somero. Daŭrige estos vizitata la Granda Budho de Kamakuro, amida bronza Budho, la dua plej granda budha statuo en Japanio, kiu altas 13,35 metrojn. Ĝi troviĝas en la templo Kotokuin. Poste la ekskurso iras al la Hase-Templo, kie en la ĉefa konstruaĵo troviĝas la plej granda ligna statuo en Japanio, la statuo de la diino de indulgo Kannon, kun siaj 9,18 metroj. La statuo havas dek unu kapojn, kiuj reprezentas po unu la trajtojn de la dieco. Fine estos vizitata la sanktejo Tsurugaoka Hachimangu, la plej grava sanktejo en Kamakura. Ĝi estis fondita fare de Minamoto Yoriyoshi en 1063 kaj pligrandigita kaj translokita al sia nuna loko en 1180 laŭ peto de Minamoto Yoritomo, la fondinto kaj unua ŝoguno de la Kamakura dinastio.



## E6 Hakone

*Merkredo* *Ekiro: 8h00* *Reveno: ĉ. 19h30* *Prezo: 78 EUR*

La ekskurso iros al Hakone Sekisho-ato, loko kie la vojaĝantoj estis kontrolataj en la Edo-erao por eviti kontrabandon de armiloj kaj virinoj. La kontrolejo estas rekonstruita kun pupoj por montri la tiaman etoson. Poste la ekskurso iros al la lago Ashi (Ashinoko), kiu formiĝis antaŭ tri mil jaroj post la lasta erupcio de la vulkano Hakone. La plej belaj vidaĵoj de la lago kun la Fuĵi-Monto kiel fono estas el Moto-Hakone, el la Hakone Palaca Ĝardeno kaj el la boatoj kiuj krozas sur la lago. Ankoraŭ ĉe la monto estos vizitata Owakudani, loko kun varmaj fontoj kaj riveroj kaj sulfuraj gasoj. La sanigaj efikoj de ovoj boligitaj en tiuj sulfuraj akvoj laŭdire plilongigas la vivon je sep jaroj.



## E7 Fuĵi-Monto

*Merkredo kaj vendredo* *Ekiro: 7h30* *Reveno: ĉ. 20h00* *Prezo: 66 EUR*



Tiu ĉi ekskurso iras al la famega Fuĵi-Monto, la simbolo de Japanio. Unue ni iras al Kawaguchiko, termobaneja restadejo, la plej facile atingebla loko survoje al la Kvin Lagoj de Fuĵi. De tie ni prenas la linion Fuĵi-Subaru, kiu iras ĝis la kvina nivelo de la monto, je 2305 metroj, en 40 minutoj. Dum la 30-kilometra vojaĝo ni raviĝas pri la ĉirkaŭa naturo, la lagoj, alpoj, kaj la okpinta monto Yatsugatake.

# Duontagaj ekskursoj

## D1 Kirin-bierfarejo

*Mardo kaj ĵaŭdo posttagmeze (14h00-17h30)* *Prezo: 39 EUR*



Jen ekskurso al unu el la plej konataj bierfarejoj en Japanio, Kirin. Dum la ekskurso vi povos sekvi la tutan proceduron por fari bieron kaj eĉ gustumi kelkajn el la diversspecaj bieroj produktataj en la fabriko.

## D2 Souji-ji-Templo kaj meditado

*Lundo posttagmeze (13h30-17h30) kaj mardo matene (08h30-12h30)*
*Prezo: 51 EUR*

La Souji-ji-Templo estas unu el la du centraj temploj de la Zen-budhisma skolo Soto. Ĝi grandas je 500 000 m² (inkluzive de 1000-tatamo-ĉambro Daisodo). La vastan lokon okupas multaj haloj kaj abundas diversaj Budhaj statuoj kaj malnovaj kulturaj valoraĵoj. Dum la ekskurso vi povos partopreni en Zazen (sid-meditado) dum 30 minutoj.



## **D3** Zoorasia

*Lundo kaj ĵaŭdo matene (08h30-12h30)* *Prezo: 43 EUR*

---

Jen unu el la plej bestamikaj bestoĝardenoj en la mondo. La Zoorasia bestoĝardeno estas, krom enorma (53 hektaroj), ankaŭ la plej infanamika en Japanio. Ĝi enhavas pli ol 1500 bestojn de pli ol 150 specioj el diversaj mondopartoj. Alia impresa afero estas la zorgo loĝigi la bestojn en lokoj tre similaj al iliaj naturaj habitatoj.

*La subaj ekskursoj organizitaj de LKK parte okazas piede, parte uzas publikajn transportilojn!*

## **D4** Minato-Mirai 21

*Sabato kaj lundo posttagmeze (13h30-16h00), ĵaŭdo matene (9h30-12h00)*
*Prezo: 22 EUR*

---



La Kvartalo MM21 estas la nova kaj daŭre kreskanta centro de Jokohamo, kie troviĝas du el niaj kongresejoj. La kvartalo plenumas aktivan rolon kiel centro de komerco, internacia komunikado, kulturo, turismo ktp. La natura beleco kaj ampleksaj konstruaĵoj sendube ĉarmos vin ne nur tage sed ankaŭ vespere pro la lumigita pejzaĝo. Ni transpasos unue la Internacian Ponton kaj marŝos laŭ la 500-metra antikva fervoja trako. Poste ni vizitos la Pormemor-Parkon de la Velŝipo Nipponmaru, alinome "Cigno de Pacifiko". Ĝi estis konstruita en 1930 kiel trejnŝipo kaj navigadis 1 830 000 kilometrojn ĝis 1984. Laste ni vizitos la Simbolan Turon, kiu estas 70-etaĝa kompleksa konstruaĵo kaj la plej alta en Japanio (296 m). Ĝi estas la simbolo de Jokohamo kaj havas hotelon, oficejojn, butikojn, restoraciojn kaj komunan spacon. Ni supreniros al la rigardejo sur la 69-a etaĝo per la plej rapida lifto en Japanio. De tie ni povos rigardi panoramon de la mirinda pejzaĝo de Jokohamo kaj, kun vetera bonŝanco, ankaŭ la Fuĵi-Monton.

## **D5** Jamaŝita, Ĉina Kvartalo kaj Jokohama Haveno

*Dimanĉo kaj ĵaŭdo posttagmeze (13h30-16h00), mardo matene (9h30-12h00)*
*Prezo: 17 EUR*

---

De la kongresejo al la Parko de Jamaŝita ni prenos 20-minutan regulan boaton: Marbuso. La parko etendiĝas unu kilometron laŭlonge de la marbordo kaj ampleksas 74 000 kvadratajn metrojn. Ĝuante la havenan pejzaĝon, ni povas admiri kelkajn statuojn kaj monumentojn kiel Diinon de Akvo, Hindan Akvoturon kaj Knabinon kun Ruĝaj Ŝuoj. Majeste pozas la ankrita ŝipo Hikaŭa-maru jam de 1961, iama pasaĝerŝipo nomata Reĝino de Pacifiko. Poste ni vizitos la Muzeon de Pupoj, kiu entenas ĉ.10 mil pupojn el 138 landoj. El ili ĉ.1700 pupoj estas ekspoziciataj; japaneskaj kaj fremdaj pupoj en siaj nacikostumoj troviĝas en tri etaĝoj, kaj, en la 4-a etaĝo, ni povos spekti pupteatran prezenton. Plue ni iros al unu el la plej grandaj ĉinaj kvartaloj en la mondo. Pli ol 500 ĉinaj restoracioj kaj butikoj troviĝas ĉe la stratoj kaj flankaj vojetoj. Ni vizitos grandiozajn sanktejojn, t.e. Kantei-Bjoo (Guan Di Miao, dio de komerco ) kaj Maso-Bjoo (Ma Zu Miao, diino de la maro). Revenante ni promenos tra la pordegojn Zenrin kaj Genbu ĝis la stacio Nihon-oodoori (Linio de Minato-Mirai) por reveni al la kongresejo.

## **D6** Sanktejo de Isejama kaj Noo-teatro

*Dimanĉo kaj mardo posttagmeze (13h30-16h00), vendredo matene (9h30-12h00)*
*Prezo: 5 EUR*

---

Jen ekskurso por esplori la japanajn kulturon kaj tradiciojn. Unue ni vizitos piede la Parkon de Kamon-jama, fama pro la printempaj sakurfloroj. La parko, memore al Ii Naosuke, unu el la ĉefministroj en la fina etapo de la Tokugaŭa dinastio (1603-1868), estas populara ripozejo por la urbanoj. Due, ankoraŭ en la parko, ni vizitos la Noo-teatron. Depende de tio, se ne estos iu prezento dum la vizito, ni povos eniri en la internon de la teatro kaj spekti la scenejon kaj la ekspozicion de pompaj kostumoj, instrumentoj k.a. La sekva celo estos la Sanktejo Isejama, la loka protektejo kaj religia filio de Ise-Ĵinguu por tennooj, situanta en la gubernio Mie. Tie okazas grandiozaj diservoj en ĉiu dua jaro. Sur la tereno staras multaj sakuroj, kaj okazas fojfoje geedziĝa ceremonio aŭ preĝado por bona kreskado de infanoj ktp. Laste ni revenos al la kongresejo tra la dekliva vojo Momiĵi-zaka, kaj tra la Reĝina Placo konsistanta el bazaro kun diversaj vendejoj, unika magazeno kaj hotelo.

## **D7** Ĝardeno Sankeien kaj havenparko-areo

*Lundo matene (9h30-12h00) kaj vendredo posttagmeze (13h30-16h00)*
*Prezo: 25 EUR*

---

Perbuse ni atingos la ĝardenon Sankeien. La vasta japaneska ĝardeno kun areo de 180 000 m$^2$ estis konstruita en 1906 de Hara Sankei, silka komercisto kaj granda mecenato de japaneska arto. Karakterizas la ĝardenon rafinitaj aranĝoj de kelkaj konstruaĵoj translokitaj el diversaj lokoj, kiel ekzemple Kioto, Nara kaj Kamakura. En la ĝardeno troviĝas domo de te-ceremonio konstruita en la 17-a jarcento, trietaĝa pagodo pli ol 500-jara, malnova farmodomo ktp. Sankeien estas vizitinda loko ankaŭ pro belaj floroj de umearboj, ĉerizarboj kaj azalearboj. Poste ni veturos al la Monteta Parko Fronte al la Haveno, kie ni promenados ĝuante la panoramon de la Haveno de Jokohamo, Granda Kajo, Kvartalo Minato-Mirai 21, Hikaŭa-maru, Lumturo, Golfponto de Jokohamo ktp. En la ĉirkaŭaĵo troviĝas la Memordomo de iama verkisto Osaragi Ĵiroo, la Muzeo de Moderna Literaturo Kanagaŭa, la Tombejo de Alilandanoj, Eŭropstilaj Domoj ktp.

# Semajna skemo de ekskursoj

T = tuttaga ekskurso; M = duontaga ekskurso matene; P = duontaga ekskurso posttagmeze

| | Sab 4/08 | Dim 5/08 | Lun 6/08 | Mar 7/08 | Mer 8/08 | Ĵaŭ 9/08 | Ven 10/08 | Prezo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| E1 | | | | T | T | | | 58 EUR |
| E2 | | | T | | T | | | 55 EUR |
| E3 | | | | | T | | | 59 EUR |
| E4 | | | | | T | | | 62 EUR |
| E5 | | | | | T | T | | 65 EUR |
| E6 | | | | | T | | | 78 EUR |
| E7 | | | | | T | | T | 66 EUR |
| D1 | | | | P | | P | | 39 EUR |
| D2 | | | P | M | | | | 51 EUR |
| D3 | | | M | | | M | | 43 EUR |
| D4 | P | | P | | | M | | 22 EUR |
| D5 | | P | | M | | P | | 17 EUR |
| D6 | | P | | P | | | M | 5 EUR |
| D7 | | | M | | | | P | 25 EUR |

# Bankedo

La bankedo okazos en lundo, de la 19h00 ĝis la 20h30, en salono Hodler. Ĝi estos japanstila bankedo kun memservado ĉe bufeda tablo. Tri pladoj el la antaŭmanĝo kaj kvar el la ĉefmanĝoj, signitaj per la 🌿-simbolo sube, estas vegetaraj. Eblas mendi surloke vinon aŭ aliajn trinkaĵojn kontraŭ aparta pago.

**Menuo**

ANTAŬMANĜO

*Fritita avokado kaj marinita tomato kun blufromaĝa saŭco* 🌿
*Riznudelo kun kareo* 🌿
*Toŭfusalato* 🌿
*Anaso kun verdcepa salato*
*Fumaĵita salmo kaj legomradiksalato*

ĈEFMANĜO

*Fritaĵo el kazeo kaj fazeoloj* 🌿
*Vegetara supo* 🌿
*Vegetaĵoj volvitaj de "Yuba"* 🌿
*Somen-nudelo* 🌿
*Stufita kokino "chikuzenni" kaj sezonaj vegetaĵoj*
*Fritita ovaĵo kaj vaporumita marangilo*
*Fritita porkaĵa bovlo*
*Speciala bovaĵa kareo*

DESERTO

*Hejmfaritaj kukoj*
*Fruktoj*

**Trinkaĵoj**

*Biero kaj sukoj*
*Kafo aŭ teo*

**Prezo:** 65 EUR

# Provizora programo

Ĉi tie aperas nur la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.

**Sabato, 4 aŭgusto**. Malfermo de la kongresejo je la 09h00. Alveno de kongresanoj kaj registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Loĝigo. Komitato de UEA. Unuafojaj Kongresanoj (18h00). Artistoj. Libroservo. Movada Foiro (19h00) Interkona Vespero (20h00). Giĉetoj funkcias ĝis la 18h00.

**Dimanĉo, 5 aŭgusto**. Solena Malfermo (10h00). Ekumena Diservo. Inaŭguro de IKU/AIS. Kongresa Temo. Paroligaj Kursoj. Libroservo. Nacia Vespero.

**Lundo, 6 aŭgusto**. Kleriga Lundo. ILEI. IKU-Prelegoj. Cseh-Kurso kaj -Seminario. Paroligaj Kursoj. Japana Eksprese. Ekzamenoj (registriĝo kaj antaŭtesto). Strategia Forumo. Komitato de UEA. Libroservo. Bankedo. Balo.

**Mardo, 7 aŭgusto**. Tago de la Lernejo. IKU-Prelegoj. Kongresa Temo. Cseh-Kurso kaj -Seminario. Paroligaj Kursoj. Japana Ekspreseso. Ekzamenoj (skribaj). Estraro Respondas. Landa Agado. Delegita Reto. Libroservo. Teatro.

**Merkredo, 8 aŭgusto**. Tuttagaj ekskursoj. Kongresejo fermita.

**Ĵaŭdo, 9 aŭgusto**. Tago de la Libro. IKU-Prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Belartaj Konkursoj. Cseh-Kurso kaj -Seminario. Paroligaj Kursoj. Ekzamenoj (parolaj). Japana Eksprese. CO Respondas. Urba Akcepto (por invititoj). Libroservo. Koncerto.

**Vendredo, 10 aŭgusto**. Komitato de UEA. IKU-Prelegoj. Cseh-Kurso kaj -Seminario. Paroligaj Kursoj. Faka Forumo. Aŭkcio. Ĉefdelegitoj kaj Perantoj. Venontaj UK-oj. Libroservo. Internacia Arta Vespero.

**Sabato, 11 aŭgusto**. Solena Fermo (10h00). Libroservo (ĝis 14h00). Fermo de la kongresejo (14h00).




**Infanvartejo**
5-a etaĝo, Pacifiko-Jokohamo/
Konferenca Centro
Ĉiutage de la 4-a ĝis la 10-a de aŭgusto, krom ekskursa merkredo.
08h45 Akcepto
18h15 Ĝisrevido
Halo Minato Mirai: B1/subtera etaĝo (infanvarta ĉambro)
Ankaŭ dum la Solena Fermo en la 11-a de aŭgusto.

# Programeroj dum UK

**Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA.** Dum la UK okazos la Internaciaj Ekzamenoj pri Esperanto je elementa kaj meza niveloj de ILEI/UEA. La ekzamenoj konsistas el tri partoj: gramatika testo, skriba parto kaj parola parto. Nur sukcesintoj en la gramatika testo rajtas partopreni la skriban parton de la ekzameno kaj, atinginte en tiu skriba parto la sukceslimon de 60 poentoj, la parolan parton. Pro praktikaj kialoj maksimume 24 kandidatoj povos ekzameniĝi. Pro tio, anticipa sinanonco estas konsilinda. Anoncu vin, prefere antaŭ la 15-a de junio 2007, ĉe la sekretario de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK), s-ro Reza Torabi (Apt. 1, No: 65, Kh: Arian Mahmudi, Kh: Dabestan, Seyyed Khandan, IR-1631675613 Tehran, Irano; torabireza@gmail.com), kaj samtempe pagu la speciale favoran ekzamenkotizon (40% de la MA-kotizo en la loĝlando de la kandidato) al UEA-konto ilek-a. Kaze de neprezentiĝo aŭ nesukceso en la gramatika testo, oni rericevos 50% de la pagita kotizo. Se la maksimuma nombro de ekzamenotoj ne jam estos atingita, eblos sin anonci surloke, ĉe la ILEI-budo en dimanĉo. Tiam la ekzamenkotizo estos 60% de la MA-kotizo en la loĝlando de la kandidato. Oni aparte atentigas UEA-delegitojn pri la rekomendo de la Estraro de UEA, ke la delegitoj "atingu almenaŭ la nivelon de la meza ekzameno". Simile, laŭ la regularo pri la nova ILEI/UEA-ekzameno pri instrukapablo, "kandidatoj devas posedi Esperanton minimume ĝis la nivelo de la meza ekzameno de ILEI/UEA". Detalajn informojn pri la ekzamenoj, inkluzive de specimenaj testoj, oni trovas en la *Gvidilo al Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA* (2-a eld., elĉerpita). Bazaj informoj pri la ekzamenoj kaj specimenaj testoj troviĝas ankaŭ ĉe http://www.edukado.net/ekzilei.jsp.

**Lingvoekzercado kun edukado.net.** Post la granda sukceso atingita dum la pasintjaraj UK-oj, edukado.net denove gvidos paroligajn kursojn por la partoprenantoj de la UK. La du paralelaj kursoj – kiuj okazos dufoje tage dum kvar tagoj el la UK-semajno, do entute ok fojojn – estas celitaj por komencantoj kaj meznivelaj parolantoj de la internacia lingvo. La programojn gvidos la konataj Esperanto-pedagogoj s-ino Katalin Kováts kaj s-ro Sylvain Lelarge.

**Cseh-kurso kaj Cseh-seminario:** "Zamenhof kreis la lingvon kaj Cseh la metodon por instrui ĝin", oni kutime diras en Esperantio. Jen, do, ŝanco konatiĝi kun la fama metodo iniciatita de Andreo Cseh kaj uzita de elstaraj instruistoj de nia E-historio kiel Henrik Seppik, Julio Baghy, Sigismundo Pragano, Lidja Zamenhof ktp. La kurso estas destinita al komencantoj kaj la seminario al instruistoj, kiuj deziras lerni la metodon aŭ akiri ateston pri ĝi. La seminarianoj devas havi la libron *Baza Cseh-Kurso* (aĉetebla ĉe la

Libroservo de UEA) kaj ankaŭ observi la kurson. La kurson gvidos Grazina Opulskiene el Litovio kaj la seminarion Jennifer Bishop el Aŭstralio. La partopreno en ambaŭ aranĝoj estas aparte pagenda. La kotizo por la kurso kaj la seminario estas EUR 50,00 por enloĝantoj en landoj de A-kategorio, por B-landanoj EUR 38,00. La kotizo por la seminario inkluzivas la observadon de la kurso. Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la organizantoj: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando; 💻iei001@tiscali.nl.

**Japana Eksprese.** Jen tri bonaj okazoj ekkonatiĝi kun la japana lingvo, gvidate de tre kompetenta instruisto dum la tri kursetoj de la kongresa semajno. Venu sperti tiun fascinan lingvon!

# Kiu kongresos kiam kaj kie?

**38-a Internacia Infana Kongreseto (IIK)**, 4 -11 aŭgusto 2007, en Jacugatake, 170 km okcidente de Tokio. Ni invitas infanojn kaj junulojn kun bona rego de Esperanto al neforgesebla semajno. La 38-a IIK okazos en la komforta kaj moderna Esperanto-domo de Jacugatake (Yatsugatake), rande de urbeto kaj arbaro, ĉe samnoma ok-pinta montoĉeno. Ĉirkaŭ la Esperanto-Domo estas muzeo, planetario, naĝejo kaj aliaj vizitindaĵoj, kaj de tie oni povas vidi la monton Fuĵi. Por ĉiu grupo de kvin infanoj ĉeestos unu plenkreskulo. Pliaj informoj kaj aliĝilo troveblas en la retpaĝo de IIK: 🌐http://bertosch.free.fr/iik2007 aŭ ĉe la IIK-administranto: Bert Schumann, 9 rue du Couradin, FR-35510 Cesson-Sevigne, Francio; 💻bert.schumann@free.fr.

**40-a ILEI-Konferenco** okazos de la 11-a ĝis la 19-a de aŭgusto 2007 en Ranzan kaj estas proponata kiel unu el la postkongresaj eblecoj por tiuj, kiuj ŝatas ligi kelkajn E-aranĝojn en unu vojaĝo. Temo de la konferenco: "Virinoj en Esperanto-kulturo". La konferenco sesios en la Ŝtata Eduka-Centro por Virinoj en kvieta kvartalo je 15 minutoj piede de la stacio Musaŝiranzan. Alveno post UK: De la plej proksima stacio de UK-kongresejo Pacifiko Jokohamo al la stacio Musaŝiranzan, kie troviĝas la ILEI-konferencejo, kostas nuntempe 1500 enoj (ĉirkaŭ 10,5 EUR). Necesas ŝanĝi trajnojn dufoje. La aliĝkotizo varias inter 15 kaj 80 EUR depende de la kategorio kaj loĝlando de la aliĝanto. Por mendoj atingantaj ILEI post la 1-a de majo 2007 oni devas aldone pagi 40 EUR. Post la 1-a de junio 2007 la organizantoj ne plu povos mendi tranoktejon por vi. Prezoj por tranoktoj en la konferencejo estas vere modestaj – inter 17 EUR kaj 20 EUR. En la konferencejo eblas, kaj ni forte rekomendas, mendi manĝojn: matenmanĝo kaj tagmanĝo kontraŭ 6,5 EUR kaj vespermanĝo kontraŭ 8,5 EUR. Oni antaŭvidas dupartan konferencon: la 11-an – 14-an de aŭgusto por ĝenerala programo,

kaj la 15-an – 19-an de aŭgusto por kultura ekskursa programo. Por la konferenco oni antaŭvidas: inaŭguron, unutagan simpozion laŭ la konferenca temo (la 12-an de aŭgusto – tutan tagon), lingvan festivalon (la 13-an de aŭgusto posttagmeze), komitatkunsidojn (la 13-an kaj 14-an antaŭtagmeze), paralele proponitajn prelegojn de niaj samideanoj kaj invititaj gastoj, paralela(j)n seminario(j)n, aparte pagendan bankedon (mardon la 14-an de aŭgusto – komunan vespermanĝon en bona japanstila restoracio kun lukseca etoso, 50 EUR por A-landanoj kaj 30 EUR por B-landanoj), ILEI/UEA-ekzamenojn, kaj ekskursojn (TT: Nikko, merkredon la 15-an de aŭgusto, 65 EUR; DT1: Kawagoe, ĵaŭdon la 16-an de aŭgusto, 20 EUR; DT2: piede tra Ranzan, vendredon la 17-an de aŭgusto. 5 EUR; DT3: Ogawa, sabaton la 18-an de aŭgusto, 21 EUR). Informoj pri la konferenco haveblas en la hejmpaĝo de ILEI 🌐http://www.ilei.info kaj ĉe la ILEI-estrarano pri konferencoj Aida Čižikaitė, Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas, Litovio; 💻aidute@mail.lt. Aliĝilo ĉe 🌐http://ilei.info/konferenco/alighilo2007a.php.

**62-a Internacia Junulara Kongreso (IJK).** La IJK okazos en Hanojo, Vietnamio, de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto 2007. Aliĝoj kaj informoj ĉe TEJO/IJK, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎+31 10 436 1044, 📠+31 10 436 1751; 💻oficejo@tejo.org. Vizitu ankaŭ la TTT-ejon 🌐http://aktivulo.com/ijk/hanojo.htm.

# Ĝeneralaj informoj

**Disdonado de propagandiloj kaj informiloj.** Universala Kongreso estas la plej bona okazo por informi la movadan publikon pri iu nova iniciato, pri specialaj agadoj de via faka asocio, por reklami novan eldonaĵon aŭ revuon, fari donacon al ĉiuj kongresanoj, por anonci iun renkontiĝon, kursaron, varon. La plej efika maniero estas enmeti la informilon en dokumentujon kiun ricevas ĉiu kongresano. Tiu servo estas aparte pagenda (275 eŭroj), kaj necesas peti permeson de la Estraro de UEA por disdonado. Neniu dokumento rajtas esti distribuata en la kongresejo sen permeso de la Estraro.

**Salonmendoj kaj standoj (budoj).** Ĉiuj fakaj asocioj konataj al UEA ricevis mendilon por havi salonon por sia kunveno dum la UK, se ili tion bezonas. Salonmendoj devas atingi la Centran Oficejon ĝis la 31-a de marto de la kongresa jaro. Malfruajn mendojn oni traktas malprioritate kaj eblas postuli por ili ekstran lupagon. Salonon por kunveno ne povas mendi individuo (ekz. por prelego), sed nur asocioj. Se via asocio ankoraŭ ne ricevis la mendilon, bv. peti ĝin ĉe la konstanta adreso. Asocioj, movadoj, firmaoj, eldonejoj, revuoj aŭ grupoj kiuj volas aparte efike informi kongresanojn, disdoni broŝurojn, kolekti kotizojn k.s., povas mendi standon dum la

kongreso (380 eŭroj). Tiujn budojn oni ne rajtas uzi por komercaj celoj (vendado de libroj, insignoj k.s.), sed jes por kolekti mendojn.

**Kongresa Libroservo.** Universala Kongreso estas okazo ankaŭ por aktualigi vian bibliotekon, aĉetante en la plej riĉa E-vendejo de la jaro: La Kongresa Libroservo. Multaj novaj libroj, interalie el la kongreslando mem, estos unuafoje lanĉitaj en la Kongresa Libroservo, en kiu plurajn titolojn eblos aĉeti ankaŭ kun speciala rabato. La Kongresa Libroservo havas ekskluzivan rajton vendi librojn kaj aliajn esperantaĵojn dum la UK. Se vi aŭ via asocio volas vendigi viajn eldonaĵojn, necesas ke vi ofertu ilin al la Libroservo de UEA (CO) minimume du monatojn antaŭ la Kongreso.

**Pagmanieroj.** Estas diversaj kontoj kaj manieroj per kiuj oni povas pagi siajn kongresajn mendojn. Elektu tiun kiu estas por vi la plej oportuna kaj plej malkara. Tamen bv. noti ke la plej sekura kaj rapida vojo estas poŝta aŭ banka monĝiro. Se vi mendas proksime al la limdatoj, bv. ankaŭ noti ke pagoj al poŝtaj kontoj ekster Nederlando (Germanio, Svedio k.s.) povas foje daŭri eĉ unu monaton. Nepre konsideru malfermon de konstanta konto ĉe UEA, ĉar tio havas plurajn avantaĝojn. Bonvolu ĉiam sendi pagojn kaj rilatajn mendilojn al la sama instanco. Kotizojn kaj donacojn al la bonfaraj kasoj oni prefere pagu al la landa peranto (vidu la liston de la oficialaj perantoj sur la interna dorskovrilo).

Pagojn por loĝigo, ekskursoj, bankedo kaj flugbileto faru rekte al Universala Kongreso de Esperanto en unu el la jenaj manieroj:

– poŝta ĝirkonto: nederlanda konto 62 73 37 je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto en Rotterdam. IBAN-numero: NL48PSTB0000627337, SWIFT (BIC)-kodo: PSTBNL21.

– banko: per banka ĝiro al konto 42.69.01.444 je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto ĉe ABN-AmRo Bank, Rotterdam. IBAN-numero: NL86ABNA0426901444. SWIFT (BIC)-kodo: ABNANL2A.

– UEA-konto: personoj kun sufiĉa bonhavo ĉe UEA povas sendi mendilojn kaj peti debeton al sia persona konto.

– monbiletoj: oni povas sendi monbiletojn (en eŭroj aŭ valuto ŝanĝebla al eŭroj) al la konstanta adreso, prefere en registrita koverto.

– al la poŝtokonto en la nomo de Universala Esperanto-Asocio en Belgio: 000-1631831-97 / Germanio: Köln 3182.91.509 BLZ 370 100 50 / Svedio: 74374-0 / Svislando: Bulle 12-2310-0.

Se vi pagos per banka ĉeko, sendu ĝin al la konstanta adreso (vd. p. 36). La ĉeko estu en eŭroj. Pagante per banka ĝiro aŭ ĉeko de ekster Nederlando, nepre aldonu 20 eŭrojn por la bankkostoj. Prefere ne sendu ĉekojn kiuj ne estas titolitaj al unu el la bankoj en Nederlando. Kostoj por ili povas esti tre altaj. Ne forgesu ĉiam klare indiki la celon de via pago. Japanaj kongresanoj sendu mendilojn kaj pagojn al JEI.

**Kreditkartoj.** Eblas pagi ankaŭ per kreditkartoj Visa, Eurocard, Mastercard kaj American Express, indikante la numeron de la karto, la daton ĝis kiam ĝi validas kaj la 3-kontrolciferojn malantaŭj la kartoj (CVC-numero). En tiu kazo la pagata sumo tamen devas esti plialtigita per 5% pro administraj kostoj, tiel ke por grandaj sumoj estas konsilinde uzi alian pagomanieron.

**Asekuro.** La kongreskotizo inkluzivas nenian asekuron. Necesas do, ke ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga asekuro ekz. kontraŭ akcidento aŭ malsano dum la kongreso. La kongreso ne repagas mendojn (ekz. por loĝado, ekskursoj, bankedo), se la malmendo venas post la difinita limdato. Ĉar temas pri relative grandaj monsumoj, estas konsilinde asekuri sin kontraŭ eventuala nepartopreno. Pri tio konsultu vian kutiman asekuriston.

**Donacoj.** La kongreso bonvenigas donacojn por la ĉi-subaj celoj:
– Adoptaj Gepatroj: subvencias partoprenon en la Internacia Infana Kongreseto de infanoj el landoj kun transpagaj problemoj.
– Fondaĵo Canuto: helpas membrigon al UEA de esperantistoj el landoj kun transpagaj problemoj.
– Triamonda Kaso: helpas al kongresanoj el triamondaj landoj.
– Blindula Kaso: helpas al blindaj kongresanoj.
– Volontula Fondaĵo: subtenas volontulan servon ĉe la Centra Oficejo.
– Ĝenerala Kaso: por la ĝenerala subteno al la organizado de la UK.

Mencio pri ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro kaj en la revuo *Esperanto*.

# Kontaktinformoj

**Centra Oficejo de UEA, Kongresa Administracio:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎+31 (0)10 436 1044, 🖷+31 (0)10 436 1751; 💻kongresoj@co.uea.org. *N.B.* Pri ĉiuj aferoj bv. korespondi nur kun la CO kaj neniam skribi al LKK. LKK-anoj ne povas trakti individuajn petojn kaj leterojn kaj ne respondos ilin. **Retpaĝoj:** 🌐http://www.uea.org/kongresoj kaj (retpaĝo de LKK) 🌐http://www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/espe/gheneralo.htm.

# Kongresaj perantoj

Se estas en via lando, prefere sendu viajn mendilon kaj pagon al la peranto. Se ne, sendu la mendilon kaj pagon al Roterdamo. Mendojn sen pago oni ne traktos.

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto House, 143 Lawson St, Redfern NSW 2016
**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg
**Belgio:** Marcel Delforge, Rue des Glacières 16, 6001 Charleroi-Marcinelle *aŭ* Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
**Britio:** Esperanto-Asocio de Britio, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE
**Ĉeĥio:** KAVA-PECH, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice
**Danio:** Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4.tv., 2100 København
**Estonio:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, 93812 Kuressaare
**Finnlando:** Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki
**Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris
**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz
**Grekio:** Helena Esperanto-Asocio, Aristidu 9, 105 59 Athina
**Hispanio:** S-ro Pedro A. Garrote Escribano, Apartado 119 Esperanto, 47080 Valladolid *aŭ* Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, 08200 Sabadell
**Hungario:** Hungarlanda Esperanto-Asocio, Pf. 193, 1368 Budapest
**Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, 101 Reykjavík
**Israelo:** Jehoŝua Tilleman, 97-a Dereĥ-Akko, 26373 Kirjat-Mockin
**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, 20143 Milano
**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, 162-0042 Tokyo
**Kanado:** Olga Du Temple, 765 Braemar Avenue, North Saarnich, BC V8L 5G5
**Korea Resp.:** Korea Esperanto-Asocio, 1601 Kangbyon Hanshin Core B/D, 350 Mapo-dong, Mapo-gu, Seoul, 121-703
**Kroatio:** Boris Di Costanzo, set. Carmen Sylve 19, 51410 Opatija
**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības iela 35-13, Rīga 1045
**Litovio:** Litova Esperanto-Asocio, ab.k. 167, 3000 Kaunas C
**Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam
**Norvegio:** Agnar Fitjar, Wiers Jenssens vei 33A, 5089 Bergen
**Nov-Zelando:** David Dewar, 4 Harlech Mews Avonhead, 8004 Christchurch
**Pollando:** Jan Książek, ul. Paderewskiego 6 m 2, 97-300 Piotrków Tryb *aŭ* Jan Skonieczka, ul. Chłodna 23ª, 85-345 Bydgoszcz
**Rusio:** Miĥail Ĉertilov, P.f. 21, 143000 Moskva-Odincovo-6 *aŭ* Halina Gorecka, ab.ja. 1248, 236039 Kaliningrad *aŭ* Viktor Kudrjavcev, ab.ja. 132, 620041 Jekaterinburg
**Serbio:** Milica Ristić-Dokmanović, Bul. Oslobodjenja 29/II, 11000 Beograd
**Slovakio:** Milan Neubeler, Popradskej brigády 14, 058 01 Poprad
**Svedio:** Lisbet Andréasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby
**Svislando:** François Randin, Pf. 246, 1000 Lausanne 22
**Usono:** Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530

*JAL – Japan Airlines estas la oficiala flugkompanio de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto. Apud la jam ekzistantaj malaltaj prezoj el ĉiuj urboj en sia reto de vojaĝceloj, ĝi ofertas al la kongresanoj specialajn prezojn por flugoj el kvar landoj de Eŭropo al Tokio.*



Por flugoj aĉetitaj ĝis la 15-a de februaro 2007: el Belgio[1], Francio kaj Nederlando €700,00[2], el Germanio €740,00[2].

Por flugoj aĉetitaj ĝis la 31-a de marto 2007: el Belgio[1] €750,00[2], el Francio kaj Nederlando €820,00[2], el Germanio €840,00[2].

Por flugoj aĉetitaj ĝis la 31-a de majo 2007: el Belgio[1] €800,00[2], el Francio kaj Nederlando €900,00[2], el Germanio €940,00[2].

La kontaktadresoj por aĉeti flugbiletojn por la speciala kongresa prezo estas:

| **Belgio** | **Francio** | **Germanio** | **Nederlando** |
|---|---|---|---|
| s-ro Marc Bekaert | s-ino Marie Bellentani | s-ino Shoko Kameyama | s-ino Joanne Yang |
| m.bekaert@jalpak.be | bellentani@jalpak.fr | shoko.kameyama@jalpak.de | info@japantours.nl |
| JALPAK Brussels | JALPAK Paris | JALPAK Frankfurt | JALPAK Amsterdam |
| Avenue Louise 283, Box 17 | 4 rue de Ventadour | Rossmarkt 15 | Jozef Israëlskade 48c |
| 1050 Brussels | 75001 Paris | 60311 Frankfurt/Main | 1072 SB Amsterdam |
| ☎+32 (0) 26390910 | ☎+33 (0) 144551571 | ☎+49 (0) 6992187749 | ☎+31 (0) 205709870 |

Por aliaj landoj nepre demandu ĉe via plej apuda JAL-oficejo/agentejo pri prezoj kaj kondiĉoj de la flugbiletoj. La adresoj troviĝas en la retejo www.jal.com.

JAL estas internacie konata pro altkvalita servo kaj komfortaj novaj aviadiloj kun la plej modernaj ekipaĵoj por dumfluga distriĝo. Kiel unu el la plej grandaj flugkompanioj de la mondo, JAL eĉ pli fortigos sian pozicion post eniro en la alianco **one**world, en aprilo 2007.

[1]Por Belgio validas nur flugoj el Amsterdamo. Inter Bruselo kaj Antverpeno kaj la flughaveno Schiphol funkcias ir-revena busa transporto de JAL.

[2]Al tiuj prezoj aldoniĝas impostoj k.a. eventualaj pagoj. Prezoj por minimume 6-taga kaj maksimume 3-monata restado en Japanio, nur por rektaj flugoj. Por flugoj tra alia eŭropa lando (ne-rektaj flugoj, ekz. Frankfurto–Londono–Tokio–reen) validas aliaj rabatitaj prezoj. La specialaj prezoj validas nur por kongresanoj, kies aliĝo al la UK estas pagita kaj registrita antaŭ la aĉeto de la flugbileto.